POLA ESPERANTISTO

JARO XXIII. FEBRUARO 1929. · NR. 2.



ROK XXIII. LUTY 1929. · NR. 2.

ESPERANTYSTA POLSKI

WYDAWCY: ELDONANTOJ: POLA ESPERANTISTA KLUBO & SOCIETO ESPERANTO EN KRAKÓW

ADRES: KRAKÓW, ULICA LUBICZ Nr. 34.

REDAKTOR PROF. DR. ODO BUJWID REDAKTANTO

PRENUMERATA: rocznie Zł. 8·—, półrocznie Zł. 4·—. Dla towarzystw i grup esperanckich (przy przesyłce najmniej 5 egz. pod jednym adresem roczna prenumerata Zł. 6·—.

ABONO: jare Zł. 8·—. duonjare 4·—. Por societoj kaj grupoj esperantistaj (ĉe sendo de minimume 5 ekz. al unu adreso) jarabono Zł. 6·—

Konto Pocztowej Kasy Oszczędności Kraków Nr. 406.660.

Eksterlande jarabono — 1 dolaro.

Pojedynczy numer Zł. 0,70 Aparta numero.

OGŁOSZENIA:		ANONCOJ:	
1 strona	Zł. 60·—	1 paĝo	Zł. 60·—
1/2 strony	„ 32·—	1/2 paĝo	„ 32·—
1/4 strony	„ 17·—	1/4 paĝo	„ 17·—
1/8 strony	„ 10·—	1/8 paĝo	„ 10·—

TREŚĆ — ENHAVO:

K. M. DĄBROWSKI: HALLO! HALLO! GDZIE POLSKIE RADJO? **DR. ADAM GADOMSKI:** LA POLAJ MALKOVRINTOJ KAJ VOJAĜINTOJ. **L. RYGIER:** KANTO DE L'NOKTO. (ESPERANTIGIS EUG. RYTENBERG). **JAN KOSTECKI:** ZAMENHOF VIVANTA. **LUDWIK BRODZICKI:** POLLANDA KRONIKO. **DR. L. DREHER:** UZUPEŁNIENIA GRABOWSKIEGO. **BULTENO DE U. E. A. BIBLIOGRAFIO. LETERKESTO. ADAM GRZYMAŁA SIEDLECKI:** VERA HISTORIO DE DON JUAN (EL LA POLA LINGVO TRAD. BR. KUHL).

POLA ESPERANTISTO

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE.

ESPERANTYSTA POLSKI

MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ.

ROK XXIII. JARO. | KRAKÓW LUTY 1929 FEBRUARO | Nr. 2 N-o.

HALLO! HALLO! GDZIE POLSKIE RADJO?

Ziściły się ikarowe marzenia ludzkości. Skrzydeł dostarczyła jej współczesna technika, której niebywały rozwój zniósł przestrzeń i czas od chwili, gdy wytworem jej stały się koleje, telegrafy, samoloty, automobile i radjo. Marzenia najśmielszych fantastów spełnione. Wysiłek w tym kierunku dał nieoczekiwane rezultaty, a przyszłość może jeszcze większych cudów dokonać. Niemal cudem bowiem możemy nazwać wynalazek ostatnich lat, jakim jest radjo.

Anteny wypromieniowują w najodleglejsze zakątki kuli ziemskiej fale przenoszące słowa ludzkie, obrazy ich myśli.

A jednak daleko nam jeszcze do doskonałości w tym kierunku. Odczuwamy brak aparatu, któryby potrafił przekształcić dźwięki mowy francuskiej lub angielskiej na polską, czy odwrotnie.

Nie łudźmy się! Technika nie wynajdzie transformatora, czy prostownika, któryby mógł spełnić to zadanie.

Fale radjowe nie uznają żadnych granic, ani politycznych, ani językowych, ani celnych. Te barykady, stworzone przez ludzi, nie stanowią dla nich żadnej zapory. Jedyną zaporą, która zarówno teraz, jak i tysiące lat temu stała na przeszkodzie wzajemnemu porozumieniu się ludzkości, jest wielojęzyczność, to odwieczne przekleństwo wieży Babel. Wobec czterech tysięcy języków i narzeczy, jakiemi posługują się ludzie, zamieszkujący kulę ziemską, nie można w radjo posługiwać się ograniczoną liczbą uprzywilejowanych języków, gdyż tylko mała garstka wybranych, znająca dany język, mogłaby z tego odnieść korzyść. A nie trzeba zapominać, że radjo jest udostępnione dla najszerszych warstw społeczeństw ludzkich. Zadanie radja byłoby chybione, gdybyśmy nie mieli jakiegoś rozwiązania. Rozwiązanie takie daje nam język Esperanto.

Do tych celów nie może być użyty żaden z języków naturalnych, gdyż żaden naród nie zgodziłby się na oddanie supremacji jakiemukolwiek językowi narodowemu. Duma narodowa i poczucie własnej, więcej lub mniej uzasadnionej wielkości, nie pozwoliłyby na to.

Mieliśmy dowody, że głosowania nad wyborem któregokolwiek z języków narodowych nie doprowadziły do zadowalających wyników. Każdy naród proponuje swój język, udowadniając argumentami wątpliwej wartości, że właśnie ten, a nie inny, najlepiej nadaje się do międzynarodowych celów; prawdziwe zamieszanie, rozbieżność, chaos. Ideologja i naczelne hasła Esperanta nie kolidują z nacjonalizmem, gdyż Esperanto uznaje w pełni prawa do życia języków narodowych w obrębie danych terytorjów językowych, narzuca się zaś z usługami, jeżeli chodzi o porozumienie się przedstawicieli kilku, a często kilkunastu narodowości. Zaleca się swoją łatwością, melodyjnością, giętkością. Nie obarczony zaś balastem formuł gramatycznych i wyjątków, a zarazem nie obrażając niczyjej dumy narodowej, idealnie nadaje się do wymiany myśli na terenie międzynarodowym. Stwierdziła to już Liga Narodów, cały szereg poważnych towarzystw, instytucyj naukowych, firm handlowych i przemysłowych, stokilkadziesiąt radjostacyj nadawczych.

Do roku 1927, — 33 państw nadawało przez radjo programy także i w języku Esperanto, urządzały kursy tego języka, które cieszyły się wielką popularnością wśród słuchaczy i zyskiwały powodzenie. W roku 1928 liczba tych państw i stacyj wzrosła jeszcze bardziej, brak jednak dotąd było stacyj polskich. Za wyjątkiem kilku wzmianek o Esperancie, z anten polskich radjostacyj nadawczych nigdy nie biegły fale w tym języku, których celem miałaby być propaganda kultury polskiej. Stale omijaliśmy i omijamy tę niezwykle ważną sposobność zaznajamiania zagranicy z naszym dorobkiem kulturalnym, choć niewątpliwie programy polskie nadawane w języku Esperanto cieszyłyby się zagranicą dużem powodzeniem. Polska jest przecież ojczyzną Esperanta, a wymowa esperantystów polskich uznawana za wzorową.

Nie nadając audycyj esperanckich, narażamy się na to, że esperantyści w Polsce w pogoni za żywem słowem esperanckiem szukają stacyj sowieckich, niemieckich i litewskich, wrogo względem nas nastrojonych, które, wykorzystując to, że fale radjowe nie uznają granic politycznych, stale nadają w tymże języku swoiście zabarwione wykłady i informacje o Polsce. Pierścień: Wrocław z Gliwicami, Królewiec z Gdańskiem, Kowno, Mińsk, Moskwa i Kijów znakomite nam pod tym względem oddają usługi!...

Tak więc dla zwalczania tej wrogiej nam propagandy, a także dla informowania zagranicy o Polsce, co jest rzeczą pierwszorzędnej wagi, posługujmy się językiem Esperanto, dostępnym dla wszystkich narodowości i jednakowo dla wszystkich łatwym.

Pamiętajmy o tem, że Esperanto i radjo, to dwie bliźniacze latorośle potężnej myśli ludzkiej, to dwa twory umysłu z natury swojej przystosowane do życia w symbiozie. Lekceważenie tego współżycia wychodzi na szkodę tak dla radja, jak i dla Esperanta, ścisła zaś łączność z drugiej strony pomoże i przyczyni się do wspaniałego rozwoju i osiągnięcia pełnej doskonałości.

Wymieniamy z sąsiedniemi państwami audycje radjowe. Nadajemy zapomocą swych stacyj programy muzyczne dla zagranicy. Muzyka jako dzieło sztuki o międzynarodowym charakterze, zarówno w tem jak i w innem państwie, z łatwością może być rozumianą. Lecz czy nie moglibyśmy wymieniać z państwami całego świata, nietylko artystycznych produkcyj muzyki polskiej, ale i żywego słowa? Skarżą się radjosłuchacze z zagranicy, że, słuchając naszych programów zapowiadanych po polsku i francusku, nie rozumieją ani słowa. Dlaczego nie używamy w tych wypadkach Esperanta? Dla jakich powodów używamy języka francuskiego? Czy jest on językiem międzynarodowym, zrozumiałym dla wszystkich?

Jakie są zapatrywania na konieczność wyboru wspólnego języka w audycjach, przeznaczonych dla całego świata, wypowiedział się jasno i zdecydowanie cały szereg instytucyj radjofonicznych, jak „Przygotowawcza konferencja międzynarodowego porozumienia w sprawie radjofonji", „Międzynarodowy kongres radjoamatorów", „Konferencja radjoklubów niemieckich", „Międzynarodowa unja radjofoniczna" i wiele innych instytucyj tego rodzaju. Uznały one mianowicie, że w radjofonji do celów międzynarodowych powinno się używać języka Esperanto.

Zwracamy się do wszystkich radjosłuchaczy esperantystów, aby domagali się od dyrekcyj stacyj nadawczych audycyj w tym języku. Jeśli apel nasz będzie skoordynowany, znajdzie napewno oddźwięk i zwyciężymy, a owocem tego będą audycje nadawane dla esperantystów całego świata o kulturze polskiej, naszej przeszłości i różnych zagadnieniach aktualnych. Możemy szczerze zapytać, czy to nie będzie prosty, tani, a pewny sposób propagowania polskości zagranicą?

Na każdym bowiem kroku, mimo rzeczywistego wysiłku ludzi oddanych całem sercem propagandzie, spotykamy się z bolesnem dla nas lekceważeniem. Trzeba pamiętać o tem, że esperantyści całego świata bardzo chętnie chcieliby słyszeć coś z Polski, nie po polsku jednak, gdyż język ten jest dla nich niezrozumiałym.

Radjo polskie, prócz zaspakajania potrzeb krajowych ma jeszcze zadanie komunikowania się z całym światem; czyni to zaś zapomocą języka francuskiego, co jest rzeczą niewystarczającą.

Mamy nadzieję, że apel nasz trafi do przekonania odpowiednich czynników i wkrótce usłyszymy z anten polskich audycje w języku Esperanto. Chętnych do wygłaszania krótkich dziesięciominutowych odczytów o Polsce jest wielu. Trochę dobrej woli i zrozumienia korzyści, a owocnie można będzie połączyć radjo z Esperantem, te dwa twory ducha nowoczesnego człowieka, dążące do ogólnego dobra kultury i postępu.

M. K. Dąbrowski.

LA POLAJ MALKOVRINTOJ KAJ VOJAĜINTOJ.

La pasinta jaro 1928 enskribiĝis en la memoro de l' homaro, kaj precipe en la historio de malkovraj ekspedicioj, per ekspedicio de gen. Nobile, ĝia katastrofo kaj heroa agado porsava, en kiu perdiĝis Amundsen, la plej eminenta vojaĝinto de la nuntempo, la konkirinto de la ambaŭ polusoj.

Tiu-ĉi ekspedicio kaj la aliaj entreprenataj por esplori la aŭstralian enlandon, la ekzamenadoj de Tibeto, de Amazonka ĉebordlando rememorigas la periodon de la grandaj malkovraj vojaĝoj kaj de multe konataj nomoj. En ilia vico estas longa listo de Poloj, pruvanta, ke en vojaĝamo, en sfero de teresploradoj, Poloj ne restis malantaŭ aliaj nacioj.

La vicon de mondfamaj vojaĝantoj Poloj komencas en XV jrc. kuraĝa maristo Jan de Kolno, pri kiu antikvaj kronikoj aŭdigas, ke tiu-ĉi Polo en dana servo estis jam antaŭ Kolumbus en Ameriko. Do ne estas mire, ke unua scienca disertacio pri la novaj teroj estis presita en Polujo jam en 1512 j.

Jan de Kolno kondukis danan ekspedicion dum la regado de la reĝo Kristjan II al Labradoro, Tero de Baffin kaj Markolo de Hudson en j. 1476, do li atingis la bordojn de Ameriko 16 jarojn pli frue ol Kolumbus. Jan de Kolno revis konduki ekspedicion en malkovritajn de si partojn de Nord-Ameriko, sed sub pola flago. Do li komencis konstrui en Gdańsk (Danzig) propran ŝipon, tamen pro manko de subteno li ne efektivigis tiun-ĉi planon.

Ni ne povas ĉi-tie citi ĉiujn polajn vojaĝintojn, ĉar ili estis tre multaj. Pri ili skribas kronikoj kaj ilin vidis la teroj de Azio, Ameriko, Afriko kaj Eŭropo, krom tio ili postlasis interesajn priskribojn de vizitataj landoj. Ĉi-tie ni citos nur la plej gravajn, kies nomoj fariĝis mondfamaj kaj havas la meritojn de malkovrintoj.

En XVII jrc. ni trovas la personon de Kristofo Arciszewski (elp.: arciŝefski), admiralo en holanda servo, kiu konkiris de Portugalanoj Brazilon kaj fortikigis por Holando havenojn: Pernambuco, Bahia kaj Rio de Janeiro.

Politikaj okazintaĵoj en Polujo post ĝia divido kaŭzis ĉe multaj homoj mirindegajn aventurojn kaj vojaĝojn. Kaj tiel Maŭricio Beniowski (benjofski) estis de Rusoj ekzilita al Kamĉatka. Tie helpita de aliaj samsortuloj li ekregis ĝistempe havenon Petropawłowsk (vŭofsk) kaj sur konkirita rusa ŝipo li direktiĝis al la Kvieta-Oceano. Fine kun sia trupo li venis al Madagaskaro, subigis ĝin, kaj loĝantoj de la insulo proklamis lin sia reĝo.

Liaj „Memoirs and travels" (London 1790) estiĝis sensacio por la tiutempa Eŭropo. Tiu-ĉi konkirinto kaj reĝo de Madag. estis mortigita en batalo kun Francoj, kiuj tiam komencis subigadi la insulon, do li estis mortigita en defendo de sia reĝlando.

Pri Beniowski, kies patrujo estis mallibera, oni baldaŭ forgesis. Ĉiuokaze estas memorinde, ke sur Madag. siatempe flugpendis la

pola standardo kaj la reĝo estis tie Polo, armilkamarado de Pułaski (puŭaski), heroo de Usono.

Kunligite kun martirologio de la pola nacio dum postdividaj tempoj oni devus mencii tutan vicon de polaj ekzilitoj, esplorintoj de Siberio, Kaŭkazo kaj aliaj aziaj landoj, kies studoj alportadis unuajn sciencajn sciigojn pri tiuj-ĉi nekonataj regionoj.

Sed la rezultoj de tiuj-ĉi esploroj estis ĵaluze kaŝitaj de la rusa registaro, aŭ ili estis de ĝi falsataj. Mondfamon povis nur gajni vojaĝantoj subtenataj de aliaj liberaj ŝtatoj, provizitaj per sciencaj rimedoj. Tian famon akiris dro Paŭlo Strzelecki (ŝĉelecki). Post malsukceso de pola insurekcio en 1831 li veturis al Anglujo, kie li studis geografion. Fininte la studojn li multe vojaĝis, poste li albordiĝis sur malmulte tiam ankoraŭ konata Aŭstralio: li ekzamenis aŭstraliajn Alpojn, kies la plej superan pinton li nomis Monto de Kościuszko (koscjuŝko; li estis pola kaj samtempe usona heroo nacia). Strzelecki estis unu el la plej unuaj, kiuj trovis oron en Aŭstr., li esploris Novzelandon, Havajajn Insulojn kaj postlasis riĉan verkaron.

Ankaŭ la polaj esploristoj laboris en aliaj mondpartoj. En j. 1844—53 Jozef Warszewicz (varŝeviĉ) esploris Mezamerikon, alveturigante Eŭropon multvalorajn botanikajn kolektojn; inĝ. Ernesto Malinowski (malinofski) konstruis en Suda Ameriko la unuan fervojon tra Andoj sur altaĵo je 5300 m.

Vere providenca homo por Republiko Ĉilo fariĝis Polo, Ignaco Domejko, kies monumentoj estas starigitaj en multaj urboj de tiu-ĉi ŝtato. Domejko la unua atentigis pri la riĉaj kampoj de salpetro, kiu eksportata grandkvante suprenlevis la bonstaton de tiu-ĉi lando. Krom tio li tie malkovris aliajn mineralajn trezorojn, nome jodon, borakson, kupron, arĝenton kaj karbon, per kio li fariĝis la fondinto de la ĉila minriĉeco.

La mondfamon kiel malkovrinto de Kameruno en Afriko gajnis Rogoziński, kiu la tutan vivon oferis al esploradoj de tiu lando. Post la malliberigo de Polujo li kune kun aliaj polaj patriotoj intencis fondi polan kolonion en Afriko, kiu tiam ankoraŭ ne estis dividita inter la eŭropaj potencoj La pola ekspedicio ekmarŝinte en direkto de Gvinea Golfo malkovris en interno de la lando ĝis tiam nekonatajn Montojn Kamerunajn, altajn ĝis 4000 m. Tiu-ĉi malkovro estis tiutempe la vera revelacio. En ĵus malkovrita Kameruno oni elpendigis la polan standardon, kiu estis tie la simbolo de reviviĝonta Polujo en Eŭropo kaj vivanta en Afriko.

En politika mondo ekbolis post la sciigo pri la elpendigo de la pola standardo en la nove malkovrita kolonio. La ŝtatoj, kiuj konkiris Polujon, estis indignigitaj Tiam Rogoziński donis sin sub la protekton de Francujo kaj Anglujo, cedante al la angla estraro la malkovritan de si landon. Komenciĝis longaj traktadoj, en kiuj Germanoj atingis al si en 1884 j. la aljuĝon de Kameruno. Tiu-ĉi fakto rompis Rogoziński-n, kiu ekloĝis sur hispana insuleto Fernando Po. Tie li dediĉis sin al esplorado de la insulo, tie li sukcesis kune kun sia edzino (konata roman-verkistino Hajota) supreniri la plej altan pinton de tiu-ĉi insulo, Clarence Pic, de kie li povis rigardi norden la grizbluantajn Montojn Kamerunajn. (Daŭrigota). *Dr. Adam Gadomski.*

L. Rygier.

KANTOJ DE L' NOKTO.

Ho! revo dorma!...
Vi estas virga kvazaù blanka mevo,
Kaj kvazaù granda krepusko. senforma,
Ho! dorma revo!...

Ho! ora floro
Kreskinta el la sopiro kolora,
Pri bona diras mond' via odoro,
Ho! floro ora!...

* * *

En luna arĝenta agordo.
Teksita el
Nebulo tremetas la kordo,
Kvazaù fabel'...

Kaj kiel mallaùta sopiro,
Fluas la son'
De l' granda ĉiela la liro —
Potenca ton'...

Foriras la tempo laŭ ordo..,
Kantas anĝel'
En luna arĝenta agordo
Kvazaù fabel'...

* * *

Roza tagiĝo!
Mi klinas kapon antaù nokt' grandioza,
Antaù ol brulos via roz' negliĝo.
Tagiĝo roza...

Silent' — potenco,
Reganta kvazaù nubega arĝento,
Klariĝu via mistera la senco...
Potenc' — silento!...

Esperantigis
Eugeniusz ***Rytenberg.***

— Viaj okuloj ne mensogas. Jes, mi kredas, ke vi min amas.

Kiu estas nobelo, tiu komprenas, ke al sinjorinoj en tiaj momentoj ne decas nei. Kaj la kavaliro d'Asenini ne neis.

Post kelkjara agado sur tiu kampo don Juan jam tiel estis malplezurigita per la speco de sia vidsento, ke li venis foje en nian monahejon por konsiliĝi ĉe patro Vincenco. Tiu, kiel al ĉiu estas sciate, konis la herbojn kaj al multaj kripluloj helpis. Longe ili interkonsiliĝadis. P. Vincenco provis eĉ doni al li dekoktojn de urtiko, miksitajn kun lepora brasiko, sed tio ne helpis.

Kiel multjara konfesprenanto de don Juan mi povas atesti, ke tiu kavaliro multon, multon suferadis en la mondo pro siaj okuloj. Estu tio kalkulita al li antaŭ la Eterneco. Amen".

Rimarko I. La nomo Asenini montras, ke la familio de don Juan estis itala. La vorto „aseni" en la malnova toskana dialekto signifas pli malpli: „facilanima".

Rimarko II. La biografiisto de don Juan en sia raporto ne precizigis, de kia speco estis tiuj malkompreniĝoj dum kiuj li trovadis sin en la stato de „deziroj malfavoraj" por la sinjorinoj. Verŝajne estas, ke ĝi estis malkompreniĝoj de pure ideala naturo.

ADAM GRZYMAŁA SIEDLECKI.

VERA HISTORIO DE DON JUAN

EL LA POLA LINGVO TRADUKIS
BR. KUHL.

KRAKÓW 1929.
EL DONO DE „POLA ESPERANTISTO".

DRUKARNIA L. GRONUSIA I SKI W KRAKOWIE.

Karto unua.

„La senkulpe akuzitan pro troa delogado de virinoj nobelon don Juanon de Pahobas mi konis persone. Lia genta nomo estis d'Asenini. La alnomo de lia gento estis: An Quodras Buambo dal Quadarpuirille Metos.

Li estis junulo de meza kresko kaj ne bela. Juĝante laŭ lia malgaja vivo oni povas diri, ke la malfeliĉo de l'nobelo de Pahobas estis liaj okuloj. Kiomfoje li alrigadis iun homon, al tiu homo devis ŝajni, ke don Juan parolas al li per la okuloj: „mi adoras vin".

La viroj baldaŭ persvadis al si, ke kulpaj estas la okuloj de certa konsisto kaj koloro tute fizika. Tamen la virinoj neniam persvadi al si tion permesis, asertante same kiel iu malutila moralisto, ke „la okulo estas sendito de l'animo".

Antaŭ mi, modesta servisto de Dio, don Juan multfoje plendis, okazadis, ke pro diversaj kaŭzoj li malamegis iafoje iun sinjorinon, ke lia animo en tiaj momentoj plena estis je deziro malfavora por ŝi, ke li deziris elkore diri al ŝi ekz.: „por ke ci krevu" kaj jen kiam li kun tia deziro en la koro alrigardis ŝin, sinjorino tiu, se ŝi eĉ estus senlime malkvietiĝinta, tuj sereniĝis, prenis lian manon kaj parolis:

Oni elŝiris la kartojn kun forto, kvazaŭ pro urĝo, la ŝirlinio ne havas do difineblan geometrian esprimon: nek linio rekta, nek regule kurba. Oni povas nur konstati, ke la ŝiro estas ŝirforma.

La kartoj en la libro pri don Juan estas skribitaj per substanco nigra, eble inko. Kelkaj signoj permesas konkludi, ke al la skribado oni uzis anserplumon. Kun plena certeco estas permesite aserti, ke oni ne uzis skribmaŝinon.

Eble pro tio, ke en la epoko de anserplumo oni ne konis ankoraŭ la skribmaŝinojn.

Post tiuj enkondukaj rimarkoj ni povas alpaŝi al la citado de la laŭvorta teksto.

Antaŭparolo.

Preskaŭ ĉiu verkanto, se li estis en Hispanujo, tuj trovas en iu monahejo nepublikitajn ĝis nun dokumentojn rilatantajn al la mistera figuro, kiun oni konas nur laŭnome: figuro de don Juan.

La aŭtoro de tiu ĉi rakonto ne havis bedaŭrinde ĝis nun la okazon esti en Hispanujo. Mi intencas veturi tien ne pli frue ol en venonta jaro; ĉar tamen la jenan rakonton mi deziras jam nun dediĉi al don Juan, do mi estas en situacio de homo, kiu devas antaŭvidi ne nur tion, ke li dokumentojn pri don Juan en unu hispana monahejo trovos, sed ankaŭ devas antaŭvidi la plenan tekston de la diritaj dokumentoj.

Konsolas min la cirkonstanco, ke mi ne estas la unua aŭtoro troviĝanta en simila situacio. Unu el miaj plej talentaj kolegoj-verkistoj, Christian Dietriech Grabbe verkis sian dramon pri don Juan kaj Faŭst neniam estinte en Hispanujo. La entuziasmo, kiun li sentis por la hispana raso, tiris lin ofte al tiu sunplena lando; malhelpis lin tamen ĉiam la cirkonstanco, kiu videble estis karakteriza ankaŭ por la romantikaj literaturistoj kaj kiun biografiisto de mia kolego per malmultaj vortoj difinis: **monon Grabbe ne havis.**

La aŭtoro de tiu ĉi „Vera historio de don Juan" ne estas beletristo fakulo. Lia fako estas pli kritiko kaj analizo de verkoj literaturaj. Tiaspecaj verkistoj sian idealon vidas ne en romano, sed en historio de l'literaturo. Tial la dokumentojn, kiujn mi havos la okazon retrovi en proksima jaro en unu malmulte konata monahejo sur la vojo de Valencia al Burgos, mi zorgos prilabori science, t. e. ekskluzivigante la malnecesajn elementojn de subjektivismo, kiel tion ĉe la sciencaj verkoj postulas la Sciencaj Instituto.

Enkonduka noto.

La dokumentoj, kiujn mi havos la okazon retrovi en tiu malmulte konata hispana monahejo, formas specon de libro konsistanta el 9 folioj sufiĉe diversformaj.

La dimensioj de longo kaj larĝo en laŭvica ordo estas sekvantaj

cm		cm
9	×	8
12	×	10
16	×	12
3	×	12
16	×	9
19	×	6.

La longon kaj larĝon de restintaj folioj malfacile estas por mi citi, ĉar ies mano disŝiris ilin oblikve de dekstra supra angulo laŭ diagonala (pli malpli) linio al maldekstra malsupra angulo.

Ĉu la diritajn tri foliojn disŝiris iu el la historiistoj de l' literaturo, ĉu individuo staranta ekster la sfero de l' esplorantoj, mi ne scipovis diveni. Ankaŭ devas resti almenaŭ nun por ni malklara la afero, por kiu konkreta celo la diritaj kartoj estis elŝiritaj. Eble la estontaj esploristoj klarigos tion

ZAMENHOF VIVANTA.

Tre simpatia samideano petis min skribi por la „Pola Esperantisto“ aron da artikoloj pri niaj internaciaj organizoj. Vi ja scias, ke estas malfacile rifuzi al samideano. Des pli, se li estas simpatia, t. e. el tiuj, kiuj ne marĉandas aŭ amuziĝas, sed laboras por la idealo.

Mi do kolektas miajn rememorojn kaj miajn ideojn. Jen aperas antaŭ mi fantomoj de tiuj imagaj estaĵoj priparolotaj: la Lingva Komitato — „Zamenhof Vivanta“; nia universala asocio — „Sinjoro U. E. A“; I. C. K. kun sia K. R. — „la Senheredigito de Helsinki“; S. A. T. — „Tipo Kontraŭsata“.

Ĉiun el ili laŭvice priskribos mia plumo. Sed, kara samideano, mi ne estos eble sufiĉe batalema laŭdezire. Jes, certe, oni devas frapi la malbonon, kie ĝi estas. Tamen, kiam temus pri niaj rilatoj esperantistaj, oni ankaŭ ne devas forgesi, ke ĉie malantaŭ la malbono troviĝas kulpuloj, kiuj estas samideanoj, sekve amikoj niaj. Ni ilin laŭdu eĉ supermerite, ni ilin ne punu tro severe.

Nia lingvo havis sian patron, kiu estis nia Majstro. Doktoro Zamenhof ne nur kreis Esperanton, sed ankaŭ dum la unuaj jaroj vartis sian verkon, zorgante pri ĝia unueco, pri ĝia natura evoluo. Li konstatis la bezonon de firma kaj neŝanĝebla Fundamento, kaj donacis ĝin al ni. Kaj poste, timante eĉ sin mem, sian homan ŝanĝemon rilate al la Verko Finita, li volis rezigni ĉiun personan influon, ĉiun tro grandan aŭtoritaton - kaj tiel naskiĝis la Lingva Komitato, kiu de nun devis zorgi, anstataŭ li, ke al lia matura infano ne okazu malbono. La Lingva Komitato heredis do la rolon de la Majstro, kaj ĝi plenumas ĝin ĝis nun pie, prudente kaj pacience.

Danĝeroj multaj minacis. Aperis malamikoj, konkurantoj, bedaŭrinde, eĉ ankaŭ perfiduloj. Se vi esploros la historion de aliaj internacilingvaj provoj, vi trovos tie ofte nomojn de iamaj esperantistoj, erarintaj aŭ pekintaj pro memgloro.

Ĉu estas bezone diri al vi, ke tiu tendenco reformi, kiu ne mortos baldaŭ, estas plej pure utopia? Por sukcesi, lingvo internacia devas nepre esti unu. Estas vere, ke ĝi ankaŭ devas esti sufiĉe simpla kaj bela. Sed al la demando, ĉu nia Esperanto estas tia, ĉiu kiu ĝin konas bone, respondos senhezite: jes! Ĉiu, krom tiu danĝera speco: la reformisto havanta propran ideon, gravegan ideon, ke „tabloj“ devas nomiĝi „tabli“, ke „Polujo“ oni devas diri „Polio“ ĉar alie la lingvo internacia neniam estos akceptata de la tutmondo. Tiuj tipoj estas pretaj fordoni siajn fortojn, sian monon por efektivigi sian ideon. Se malgraŭ iliaj faroj Esperanto ĝis nun ekzistas, plifortiĝas, kreskas, ni danku pro tio nian pian, paciencan, prudentan Lingvan Komitaton.

Ĉiufoje, kiam ies mano etendiĝas por eltiri ŝtonon el la Fundamento, la Vivanta Zamenhof diras: „Haltu tie!“ Ĉiufoje, kiam oni volus oficialigi centon da novaj radikoj, neelprovitaj de la praktiko, ĝi diras: „Atendu!“ Kaj nur pie, prudente, pacience ĝi pliriĉigas la Trezoron, kiun ĝi gardas. Neniajn falsaĵojn en ĝin! Nur verajn juvelojn kaj perlojn.

Kompreneble, tio maplaĉas al la reformistoj. Ili estas malkontentaj pro la „testuda sinteno“ de la L. K. Ne plu kuraĝante reformi Esperanton, ili volus reformi... la L. K-on. Kial tiuj personoj, kaj ne aliaj? Kial ne reformemuloj? Kial L. K. mem elektas siajn novajn membrojn? Kaj tiuj L. K.-anoj! ili eĉ ne scias paroli korekte Esperanton!

Nu, karaj amikoj! L. K.-anoj estas homoj, kiel la aliaj. Ili povas erari. Ĉio, kion vi rajtas postuli de ili, estas, ke la L. K. mem eraru kiel eble plej malofte. Ĝis nun, ĝi ĉiam plenumis sian rolon saĝe kaj digne. Ni ĝoju pri tiu „spirito de l' domo“. Kaj anstataŭ L. K.-on reformi, ni ĝin aŭskultu. Ĉar okazas, ke homoj pasiaj je reformoj nenion scias, pri tiuj, kiuj estas jam enkondukitaj. Antaŭ kelkaj jaroj, ne hieraŭ, aperis la akademia „Klasika Libro“ enhavanta ĉiujn novajn, postfundamentajn radikojn. Lernu ilin. Lernu la Fundamenton mem. Tiam vi eble pli libere spiros en tiu Esperanto, kiu ekzistas. Kaj eble vi opinios ĝin malpli „reformenda“. Eble eĉ vi p r o n o n c o s la nomon de L. K. kun pli da estimo.

Ni konsciu, ke nur dank' al L. K. ni povas esti trankvilaj. Ni povas esti trankvilaj, ke la reguloj, kiujn ni lernis, ne estos morgau ŝanĝataj; ke tio, kion ni skribis, ne fariĝos post kelkaj jaroj nekomprenebla ĵargono; ke nia laboro efektive servas la idealon, kiun ni celas! ke ni jam parolas la lingvon internacian, kiun parolas estonte la fratigita homaro.

Ĉu malgranda, tiu profito!

Tial vivu la fidela gardisto de nia Esperanto! Vivu L. K., Zamenhof Vivanta!

Jan Kostecki.

POLLANDA KRONIKO.

Białystok. La naskiĝurbo de la Majstro apartenas al la plej viglaj en Polujo laŭ la esperanta vidpunkto. La loka Zamenhofa Esp. Societo funkcias ĉiutage kaj aranĝante konstantajn kursojn, prelegojn, prezentadojn k. t. p. altiras konstante ĉiam pli multajn rondojn. Jen mallonga eltiraĵo de tiea agado el la lastaj tri monatoj: La 16. XII. multnombre vizitita Zamenhofa Vespero kun tre riĉa programo. La 8. I. du prelegoj de holanda propagandisto, S-o A. Smit, ambaŭ tre sukcesintaj. La 25. I. Solena fermo de kurso kun disdono de distingoj, premioj kaj atestoj al la absolvitoj. La 27. I. akcepto por mondvajaĝanto-smideano S-o M. Paseka el Wien. La 1. II. perfekte sukcesinta prezentado de l' originala esperanta opereto de F. Hiller: „Ho tiuj fremduloj“ en la Teatra Salono. Krom tio funkcias en la urbo tri kursoj kun preskaŭ 70 lernantoj kaj instruado en 18 popolaj lernejoj de Białystok kaj ĉirkaŭaĵo. La „spiritus movens“ de tuta tiu ĉi vigleco estas S-o Ŝapiro, kiu krom tio trovas la tempon por tiel perfekte organizi kaj gvidi la U. E. A.-aferojn de tuta Polujo.

Brześć. Fondata estas Esperanta Societo.

Dąbrowa Górnicza. S-o C. Rabenda komencis novan kurson en vespera lernejo.

Grajewo. Esperanto estas enkondukita en la loka Regna Gimnazio. La kurson, kiun partoprenas krom la gimnaziaj lernantoj de superaj klasoj ankaŭ la instruistoj kaj poŝtoficistoj, gvidas s-oj Ŝapiro kaj Placek.

Jarosław. Danke al klopodoj de Pastro J. Makara kaj del. de U. E. A., prof. A. Wachułka komenciĝis trimonata kurso en la Pola Asocio de popollernejaj Instruistoj „Ognisko".

Kalisz. La lokaj esperantistoj klopodas nomigi unu el la stratoj — str. de Zamenhof.

Kielce. Depost kelka tempo renaskiĝas ĉi tie la tiel vigla antaŭ la milito movado. Per la klopodoj de s-oj D-ro Żurkowski, D-ro Sikorski, Król, D-ro Lewin, s-ino Wolman-Zimnowoda kreiĝis vigla societo „Antaŭen", aranĝanta kursojn, posedanta jam sufiĉe riĉan bibliotekon. Ĝojinda estas la fakto, ke instruistaj sferoj favore rilatas al nia movado; en tiu direkto oni sentas tre valoran influon de s-o prof. Roman Hermanstadt.

Kraków. La malnovajn societojn „Esperanto" kaj „Pola Esp. Klubo", kiuj — ĉu eble pro sia maljuneco iel ekdormis — digne ŝajnas anstataŭi novaj kaj junaj fortoj en la „Akademia Esperantista Rondo". Senduba estas la krea influo de l' universitata lektorato, gvidata de prof. W. Jezierski. La ĉiumerkrede kunvenanta „A. E. R." aranĝis kelkajn ekstreme interesajn prelegojn, el kiuj oni speciale devas mencii tiun pri „Paneŭropa" (de s-o B. Tuszkiewicz), kaj pri la karakterplena urbo itala „Mantova" (de s-o J. Toczyski). En la „Rondo" fondiĝis teatra rondeto, kiu preparas la prezentadon de konata komedieto „Consilium facultatis". Prof. Jezierski gvidas krom tio du kursojn: por policanoj (70 personoj) kaj por oficiroj (65 personoj). En la skolta ĵamborea trupo gvidas la kurson s-o T. Hodakowski. En la Silesia Pastra Seminario okazas kurso kun 201 partoprenantoj. En la ĵurnalo „Ilustrowany Kurjer Codzienny", kiu depost kelka tempo tre favoras nian movadon, aperis bonega artikolo pri „Esperanto en la parolata filmo" de s-o Hodakowski.

Łomża. Funkcias 3 kursoj kun 58 lernantoj instruataj de s-o M. Perelman.

Ostrołęka. Esp. estas enkondukita en la lokajn lernejojn. Instruas s-o Jagoda.

Przemyśl. S-o T. Błachuciak organizas skoltan rondon esperantistan; kurso baldaŭ komenciĝos.

Sokolka Kurso multnombre vizitata funkcias.

Wilno. La Akademia Rondo Esperantista ricevis de la Radjostacio en Wilno permeson disaŭdigi esperantan programon dum la „Akademia kvaronhoro" merkrede de la 20 h. ĝis 20.25 h. Oni disaŭdigados esperantajn prelegojn ĉiun unuan kaj trian merkredon en la monato po 10 minutoj. Jen grava sukceso, se oni rimarkas, ke ĉiuj polaj Radjostacioj plej obstine rifuzis allasi la esperantan parolon al la mikrofono. La Rondo komencis kurson kun 33 personoj gvidatan de s-o Juhnowiecki.

Ludwik Brodzicki.

UZUPEŁNIENIA GRABOWSKIEGO.

doświadczony	vivsperta
dożyć	ĝisvivi
dziwaczny	mirstranga
dżdżownica	lumbriko
fałszować	falsludi
fragment	fragmento
gaduła	babil(em)ulo
gapiowaty	malatentema
głuchy (przytłumiony)	obtuza
głupi	malsprita
gnuśny	malvigl(em)a
gołosłowny	vanta
gospodarstwo	mastrumejo
gospodarz (ugaszczający)	gastiganto
grabić (zgrabiać)	rastkolekti
graniczyć	limtuŝi
grubacz (zool.)	silfo
gwałtowny	impeta
ile, o ile	se
interesować się	interesiĝi pri
jasny	sunluma (vizaĝo)
kangur	kanguruo
katalog	klaslibro
klepać	fraptuŝi, — purigi, klaki
komża	surpliso
kongresowiec	kongresano
koniec końcem	finfine
krzyczeć na	kriadmoni
kurczyć się	ŝrumi (użyte raz przez Zamenhofa!)
lać („oblewać") w szkole	sekundumi
liścik	bileto
łupać	split(ig)i
łysy	kalva
maliniak	frambujo
mężobójstwo	hommortigo
mianownik	denominatoro (mat.)
miły	ĉarmoplena, -dolĉa
mimowoli	pretervole
mizerny	mizeraspekta
mlaskać	lipklaki
możność	facileco
najeżyć się	brosleviĝi
nasycać się (widokiem)	satrigardi
natomiast	aliparte
nauka	lernado
niezrównany	senegala
nocleg	tranokteio

Daŭrigota. **Dr. L. Dreher.**

UNIVERSALA ESPERANTO-ASO-CIO.

POLA TERITORIO. Ĉefdelegito: J. Ŝapiro, Lipowa 33, Białystok.

OFICIALA BULTENO No 5.

PREMIOJ POR FRUPAGINTOJ. Ni informas, ke la eldonejo Hirt dissendis jam al ĉiuj membroj de UEA en Polujo, pagintaj sian kotizon antaŭ la 31. 1. 1929, po unu volumo de la biblioteko „Internacia Mondliteraturo". Al membroj, kiuj malgraŭ la demando de Ĉefdelegito ne indikis ĝis fino de januaro, kiun premion ili elektas, estas dissendita premio laŭ elekto de la Ĉefdelegito. Plendoj pri okaza nericevo de la premio estu direktataj kiel eble baldaŭ al la Ĉefdelegito.

RESPONDKUPONOJ DE UEA. Ni rekomendas al la membroj la uzon de respondkuponoj de UEA, kiuj estas pli malkaraj ol la poŝtaj respondkuponoj kaj estas bone uzeblaj por diversaj malgrandaj pagoj, ekz. por mendado de libroj Esperantaj eksterlande, gazet-abonoj, afranko de respondo ktp. Ili estas akceptataj anstataŭ mono de ĉiuj Esperantaj librovendejoj ktp. Unu kajero, enhavanta diversajn kuponojn por entute 9 sv. fr., kostas 10 sv. fr. La membroj de UEA povas ĝin ricevi por 18 zl. (rekomendita afranko enkalkulita), pagante tiun sumon je poŝtĉekkonto No 60.047 en P. K. O. Varsovio. Unuopaj kuponoj kostas sen afranko: 30-centima — 60 groŝojn, 50 ct. — 95 gr. kaj 1 fr. — zł. 1,90. La respondkuponoj estas ankaŭ riceveblaj ĉe la Delegitoj.

KOERSPONDADO KUN ĈEFDELEGITO. Membroj de UEA, korespondantaj direkte kun la Ĉefdelegito, estas petataj ĉiam klare noti, ĉu ili estas novaj membroj aŭ malnovaj. En la lasta okazo necesas cito de membronumero. Tio evitigos superfluan serĉadon kaj kontroladon en la ampleksa sliparo. La adreso de korespondanto ankaŭ estu indikita. Pagojn por la Ĉefdelegito ĉiam bonvolu fari nur je lia konto en P. K. O. Varsovio No 60.047.

STATO DE UEA EN POLUJO. La 1-an de Februaro 1929 UEA havis en Polujo jam 203 membrojn (71 M, 127 MA, 2 MS kaj 3 DM). Nia membraro en Polujo do ĉiam kreskas, tamen estas necesa vigla laboro de ĉiuj membroj de UEA por atingi la nombron de 1.000 membroj por nia lando. Ni atentigas denove, ke ĉiu membro, varbinta n o v a n membron, rajtas, ricevi specialan premion por varbado. Varbilojn bonvolu postuli de la Delegito en via loko aŭ direkte de la Ĉefdelegito.

NOVAJ DELEGITOJ. Ni informas la membraron pri jena nova Delegito:
LWÓW. D. Henryk Schnützer, jurnalisto, Jagiellońska 17.
VD. (Vakas).

Membroj en lokoj, kie ne estas ankoraŭ D., estas petataj proponi al la ĈD taŭgajn personojn, kiuj povus okupi tiujn postenojn.

Białystok, la 1. 2. 1929.

J. Ŝapiro, Ĉefdelegito de UEA.

BIBLIOGRAFIO.

UNIVERSALA ESPERANTISTIGILO de dro Benson. Benson Scholl of Esperanto, Inc. Newark. N. J. U. S. A.

Kio estas tio-ĉi? Dek broŝuretoj de malgranda formato (ĉiu preskaŭ 32 paĝa), celantaj esperantistigi ĉiun nacilingvanon, tamen sen helpo de lia gepatra lingvo. Ĉu eble? Jes, ĉar Esperantistigilo estas riĉege ilustrita per bonaj desegnaĵoj, kiuj permesas laŭgrade interkonatiĝi kun „malfacilaĵoj" de la internacia lingvo kaj ilin ekregi. Nur unuaj du paĝoj de la komenca leciono, kie estas klarigitaj la prononcmaniero kaj metodo de la lernado estas skribitaj nacilingve. Krom tio nenie estas uzita la nacia lingvo. Ĉio, ĉio estas komprenigita per vere bonaj knj spritaj desegnaĵoj, kiuj faras la lernadon preskaŭ senpena kaj interesa eĉ por infanoj, kiuj ŝatas rigardi „bildetojn". La kvanto de la vokabloj uzitaj en tiuj-ĉi libretoj estas grandega kaj oni povas aserti, ke neniu kurso iam liveros al la lernanto tiom da vortoj kiom „Univ. Esper.". Ĝi povas ankaŭ esti uzadata

kiel bonega propagandilo, por pruvi al la skeptikuloj la facilecon de la Esp. gramatiko kaj mirinde logika vortfarado en Esp. Nepritakseblajn komplezojn povas U. E. plenumi kiel helpilo por ne scipovantaj desegni, se ili instruas Esp. laŭ senpera metodo, sin tiel volonte kaj ofte aplikata. Neeble, ŝajnas al mi, estus antaŭdiri, sen iame farita provo, ĉu U. E. taŭgus sen ia ajn helpo de instruanto. Versimile de tempo al tempo estus iu bezonata, kiu konas la lingvon, por forigi eblajn dubajojn. Tiom pri la metodo. — Koncerne al la lingva flanko de U. E. oni devas konfesi, ke, bedaŭrinde, enŝteliĝis kelkaj neprecizaĵoj — iomfoja manko de la supersignoj, kio speciale por la komencantoj povas esti danĝera. Estus dezirinde aldoni apartan folion al U. E. kun rimarkitaj preseraroj inter kiuj troviĝus ankaŭ kelkaj lingvaj malglatajoj, ekz. sonorilo sonorigas (anstataŭ: sonorilo sonoras), fiŝi (anst.: fiŝkapti) k. k. a. Sed malgraŭ tio U. E. estas vere rekomendinda kaj la eldoninte meritas nian dankemon, ebliginte aplikadon de la plej novaj metodoj en la instruado de la lingvo. **Theta.**

Biblioteko Tutmonda No 9. V. Korolenko, **La Sonĝo de Makaro,** Kristnaska Rakonto. El la Rusa tradukis M. Ŝidlovskaja. 1927, Rudolf Mosse — Berlin, Esperanto-Fako.

Biblioteko Tutmonda No 10. I. Al. Bratescu-Voinesti, **Niĉjo Mensogulo kaj aliaj noveloj.** El la Rumana tradukis T. Morariu. Eld. kiel supre.

Biblioteko Tutmonda No 13—14. **La Vojaĝoj kaj Aventuroj de Barono Munchausen.** El la Angla tradukis J. D. Applebaum. Unua volumo. Eld. kiel supre.

Tri diversdevenaj rakontoj, el kiuj jam famaj pro la gloro de la verkintoj estas la du unuaj. La tria estas fama pro alia cirkonstanco, nome pro tio, ke ĝi enhavas vere strangajn fabelanekdotojn en la formo de vojaĝopriskribo. Barono M. fariĝis fine proverba mensogisto, tiel nekredeblaj estas liaj fanfaronaĵoj. Sed tre amuzaj ili estas. La legantoj ne bedaŭros havigi al si tiun libron, same kiel la du antaŭajn.

Pri la lingvo de la tradukintoj mi ĉifoje ne povas ne laŭdi. Certe estas, ke la eldonejo Mosse multe mem meritas laŭdon, ĉar verŝajne kelkfoje trarigardataj kaj korektataj estis la manuskriptoj. Sed la eldonejo certe sole bonigis kio estis malbona; tion kio estas tre bona, ni devas sendube alskribi al la „konto" de la tradukintoj mem. Do estu gratulataj, vi Ŝidlovskaja kiun ni konas ja delonge kaj same vi Applebaum la fervorulo kaj vi Morariu la kuraĝa instruisto de nia lingvo. **Dr. L. D.**

LETERKESTO.

WP. H. Korczak Wierzchowski, Lwów. Za łaskawą obietnicę tak imponującej pomocy jak najserdeczniej dziękujemy. Nadesłane uzupełnienia zaczniemy umieszczać po ukończeniu pracy p. Dr. L. Drehera. Ponieważ ze względu na szczupłe ramy nie możemy słownikowi poświęcić więcej niż jedną stronę w każdym numerze — w przyszłości drukować będziemy petitem dwuszpaltowo — przeto sprawa dalszego ciągu nie jest zbyt pilną, co zresztą zdaje się odpowiadać także WPanu.

Al S-o S. J. Gr.—K. en Paris. Via fajra defendo de komercaj helpantoj estas direktita al neĝusta adreso. La koncerna respondo celis klarigi la malgrandan diferencon inter soneto kaj komerca letero al estro de firmao, kiu nepre deziris dungi en sian entreprenon la poeton por havi la plezuron lin tuj maldungi pro malkapablo verki poemojn en la formo de eltiraĵo el „saldo-conti". Vi dezirus, ke la komercaj helpantoj verku kambiojn en heksametroj aŭ aleksandrinoj. Kiu el vi ambaŭ estas prava, ni ne kuraĝas decidi. Ni konstatas nur, ke la direktaj al ni riproĉoj similas perfontan malfermadon de... larĝe malfermita pordo: ni sentas profundan respekton por Hans Sachs kies talento inspiris lin verki same geniajn ŝuojn kiel poemojn.

Al S-o R. T. en Kowel. Jes, ni legis. La insultoj montras, ke la raportinto malgraŭ ĉio estis iom prava. Ni ne vidas la kaŭzon respondi, ĉar tio signifus — laŭ la propra konfeso de tiu sinjoro — beki en rubaĵo. Nu, en rubaĵo malfacile estas sat-iĝi, se oni estas alkutimita al pura kaj sana greno.

Drukarnia L. Gronusia i S-ki. w Krakowie, Stolarska 6.

Do nabycia:

LEO TURNO — Kompletny podręcznik języka Esperanta cena 1·25 zł.
10 egz. — 9·50 zł. 20 egz. — 18·50 zł. 50 egz. — 45·— zł.

LEO TURNO — Wyższy Kurs języka Esperanto, cena 1·50 zł.
5 egz — 6·50 zł. 10 egz. — 12·50 zł. 25 egz. — 28·— zł.

Ceny rozumieją się przy zapłacie z góry gotówką. Wysyłka książek następuje bezzwłocznie w dniu otrzymania gotówki. — Porto do powyższych cen już wliczono.

Dr. Leopold Dreher, Kraków, Starowiślna 37. Konto P. K. O. 405.716.

MUZIKNOTOJ de Foxtrott -- Black-Bottom

„K — O — R — O“

Frapanta kaj bela melodio kun humorplenaj vortoj de Raymond Schwartz kaj pola traduko.

Prezo: 3 zł. kun afranko.

Mendu ĉe Pola Esp. Asocio, Lublin poŝtkesto 74.

A T E N T U!

Belaj, koloraj poŝtkartoj kun monumento de D-ro Ludoviko Zamenhof.

Prezo po zł. 0·30
100 pecoj — zł. 27·—
500 pecoj — zł. 120·—
Por afranko aldonu 5%

Por Eksterlando
20 pecoj — 4 — sv. fr. (kun afranko)
100 pecoj — 17·25 sv. fr. (kun afranko)
500 pecoj — 75·— sv. fr. (kun afranko)

Minimuma kvanto mendebla 20 pecoj.
Ekspedo nur kontraŭ antaŭpago.
Por rekomendita sendaĵo aldonu złoty 0·50
La sendaĵon nerekomenditan ni ne garantias.

Adreso: Eldona Sekcio de Pola Studenta Esperantista Societo. Warszawa, Leszno 99. m. 5.

LIBREJA FAKO DE POLA ESPERANTISTO.

REKOMENDAS:

	Zł.
Albanio. Gvidlibro	0·60
Albumo de l' VIII en Kraków. Luksege eldonita kun 600 fot.	15·00
An-Ski — Dibuk. Teatraĵo	1·25
Balucki — Kuzeto. Komedio en traduko de S. Grenkamp	0·60
Bujwid O. prof. — Kvin prelegoj pri bakterioj	1·00
Bukedo — I. kaj II. Rakontoj de diversnaciaj aŭtoroj po	1·20
Butin — Faŭsto. Komentario al la I-parto	0·60
Czubryński — Esperanto i Esperantyzm	1·20
— Esperantyzm. Wyd. II.	3·00
Dumas — La Kolomba premio	1·00
Grenkamp — Krioj de l' koro. Poeziaĵoj	0·50
— Penseroj. Legindaj precipe en kursoj	0·75
Ilustrita Gvidlibro tra Pollando kaj Danzig—Gdańsk eldon. de la P. E. D. Kraków 1927	1·50
Jung — La Alta Kanto de la Amo	1·80
Kongreslibro de l' VIII. en Kraków. Riĉe ilustrita	1·00
Kriss — Melodioj de l' nokto. Poeziaĵoj	1·00
Mickiewicz — Improvizacio de Konrad	0·50
Molière — L'avarulo	1·80
Oberrotman k. Jung — La lastaj tagoj de D-o Zamenhof.	2·50
Prozo el danaj — norvegaj aŭtoroj	1·50
Rieck — Oni ridas. Humoraĵoj	1·40
Turno — Kompletny podręcznik Esperanta (II wyd.).	1·25
— Wyższy kurs	1·50
Wiesenfeld — Galerio de Zamenhof. Kun 18 portretoj	2·40

La verkoj de Zamenhof — v. Nr. 1. de „Pola Esperantisto".

POR SENDKOSTOJ ALDONU 10% — NUR ANTAŬPAGO.

KRAKÓW, UL. SMOLEŃSKA 9.

KONTO P. K. O. 406.660.